

# Sabadell



# Esperantista



ORGANO DE "CENTRO DE ESPERANTO SABADELL" Pre.: JOSE BORDA - GRAL. MOLA, 99 - SABADELL

Julio - Agosto 1969

nº 89 Jarkolekto -12

Diálogo con nuestros socios:

VAMOS HACIA ADELANTE: Es indudable que la marcha de un movimiento, en este caso concreto nos referimos al movimiento esperantista, no responde siempre al empeño puesto por sus defensores y propagadores.

Parece que la ley de todo en la vida, es que no se camine recto en forma ascendente, a veces parece que damos dos pasos hacia adelante y uno hacia atrás o que quedamos estancados. El movimiento esperantista no puede salirse de esta ley, por lo tanto hay épocas que su progreso es recto sin estancamientos, para otras veces caer en una especie de letargo y volver a renacer con más ímpetu, alcanzando una ascensión más rápida que la anterior.

Los grandes movimientos destinados a traer una vida mejor a la humanidad, nunca han fracasado ni pueden fracasar. El desarrollo de los mismos puede ser más rápido o más lento, pero siempre en forma ascendente.

Un gran ideal como es un Idioma Internacional no puede estar condenado al fracaso, ya se llame éste Esperanto o no. A pesar de todos los desacuerdos habidos en la gran familia que es la humanidad, el hombre lucha por entenderse, por amarse y en este amar y entenderse, el idioma juega un gran papel.

En el terreno lingüístico el hombre hace mucho para entenderse porque comprende esta necesidad, ha creado centros especiales donde se instruye para poder entenderse con otros hombres que hablan otro idioma, se esfuerza en poner a su servicio máquinas especiales con la intención de solventar este problema. Pero todo esto es muy poco, no basta, ni con mucho, para resolver el caos lingüístico existente.

Nosotros, esperantistas de hoy, continuadores de un ideal que nos legaron otros samideanos, que luchaban en peores condiciones que nosotros, debemos de sentirnos orgullosos de poder contribuir en este batallar. Puede que no todo nos salga como deseamos, pero que progresemos y progresaremos más y más, no cabe la menor duda.

RONDO DE ESPERANTISTOJ LIBROJ-AMIKOJ

R - E - L - A

Tria listo de la kontribuantoj al nia	RONDO!!
Centro de Esperanto Sabadell .....	100 ptoj.
Sro. Vicenç H. Llusera .....	100 "
Sro. Joan Sala .....	300 "
Anónimo .....	500 "
Sro. Pedro Soler .....	100 "
Sro. Luis M <sup>a</sup> Hernández Izal .....	250 "
Sro. Luis Serrano .....	40 "

Kiel promesite en la antaŭa numero de Sabadell Esperantista, jen la listo de la libroj eĉetitaj okaze la XI<sup>a</sup> Barcelona Province-Renkontiĝo en Les Fonts de Terrassa:

Sub la signo de la Verda stelo.

Vivo de Ganhdi .....	Edmon Privat
Inter Sudo kaj Nordo .....	Ferenc Szilagyi
La Floroj de la Malbono .....	Charles Baudelaire
Rakontu Samideano .....	
Okuloj .....	Marjorie Goulton
La Spleno de Parizo .....	Charles Baudelaire
La Stelita Lampo .....	
Esperanto Antologio .....	William Auld.
Sonĝo sub Pomarbo .....	Julio Baghi
Fabeloj .....	H. Andersen
Logiko .....	"Martinus"
Lingvo kaj Vivo .....	Gaston Waringhien
La Teatra Korbo .....	Julio Baghy
Historio de la Mondlingvo .....	E. Drezen

NIAJ INTERVJUOJ  
=====

Plezure ni publikas intervjuon faritan al F-ino H. Sal-  
mose de Svedujo, kiu estis elektata "Miss" Esperanto okaze  
la lasta Kongreso de T.E.J.O. en Tarragona.

Mi opinias, ke je la fino de la intervjuo ĉiu eltiros  
la jenan konkludon; fraŭlino Helen Salmose estas tiel inte-  
ligenta kiel bela. Al vi, nia kara s-ino, nome de Centro  
de Esperanto Sabadell, dankon pro via ĝentileco.

Jen la intervjuo.

DEMANDO.- Mi ne kredas erari se mi opinias, ke la Kongre-  
so de Tarragono estas bela rememoraĵo por vi.  
Inter multaj aliaj konkursantinoj, inkluzive  
hispaninoj, oni elektis vin la plej bela espe-  
rantistino el Esperantujo. KION SIGNIFIS KAJ  
SIGNIFAS POR VI FARIGI "MISS" ESPERANTO?

RESPONDO.- Kompreneble por mi estis neforgesebla momento,  
kiam mi havis la grandan honoron kaj ĝojon es-  
ti elektata kiel "Miss" Esperanto en Tarrago-  
no. Kun granda plezuro mi nun pense rerigardas  
al la por mi ege agrabla kongresa balokaj dan-  
kas al ĉiuj komitatanoj kaj partoprenantoj pro  
la interesa kaj amuziga kongreso.

DEMANDO.- Ni travivas momentojn en kiuj la mondo trans-  
formiĝas, precipe pro la teknika progreso. Pa-  
ralele al tiu progreso restas problemoj, kiujn  
la homo ankoraŭ ne kapablis solvi, ekzemple,  
la pacon, la malsaton, la analfabetismon, la  
subpremadon, la lingvan problemon k.t.p. Vi,  
kiu estas juna kaj havas la vivon "antaŭ vi".  
ĈU VI OPINIAS KE IAM LA HOMO VIVOS EN PLENA FE-  
LICO KAJ KE ĈIU HOMO POVOS ĜUIJE LA t.n. PRO-  
GRESO?

RESPONDO (A). Laŭ mia opinio la homo neniam atingos stadion  
de vera feliĉo, kion ajn oni celas per la es-  
primo. Diversaj faktoroj ĉiam kontraŭagos la  
efektivigon de tia feliĉo.

RESPONDO (B). Se ni povas konservi la teron loĝebla kaj ne  
ekstermas ĉiun vivan estaĵon kun nedeziritaj  
efikoj de la teknika progreso, tago devus ve-  
ni, kiam ĉiuj homoj povas ĝui la samajn favo-

rojn. Sed bedaŭrinde estas fakto, ke la biologia sano de la mondo estas miracola pro tio ke multaj unuavide tre pripensitaj agoj ricevis neatenditajn kaj pripensitajn fatalajn konsekvencojn.

DEMANDO.-

En Hispanujo multe oni parolas pri la kutimoj en la nordaj landoj; precipe pri Svedujo, sed ni pritraktu nur la rilatojn inter gegunuloj. Vi kiu kontaktiĝis al la hispana junularo.

PAROLU AL NI IOMETE PRI LA EZISTANTAJ DIFERENC  
COJ INTER LA GEJUNULOJ, SEVEDAJ KAJ HISPANAJ.

RESPONDO.-

Bedaŭrinde mi devas konfesi mian nesufiĉan kompetenton doni detalan respondon en tiu ĉi demando. Ĉar mia restado en Hispanujo estis tre malonga, mi ne havis okazon ekkoni tre multajn hispanajn gegunulojn kaj pli detale adaptiĝi al iliaj rilatoj. Se mi ne eraras, mi tamen havas la senton, ke svedaj gegunuloj en preskaŭ ĉiuj aspektoj de la vivo havas pli da libereco ol la hispanaj. Sed kiel dirite, miaj scioj estas tro malgrendaj por raporto.

DEMANDO.-

Kiam oni parolas kun maljunulo preskaŭ ĉiam oni pritraktas pasintajn tempojn, male okazas kiam oni parolas kun juna homo, jen pro kio mi demandas al vi, KIEL VI ANTAŬVIDAS LA ESTONTECO  
N DE ESPERANTO?

RESPONDO.-

Esperanto senduble estas la solvo de la estonteco por rompi la lingvobariieron kaj devus havi grandan eblecon por disvastiĝi. Tamen estas tiel ke oni ne verbas novajn adeptojn sen penado. La esperantomovadoj kaj la unuopaj esperantistoj devas preni novajn energiajn intervenojn por atingi la homojn kun informado kaj ne nur sin izoli en malvastaj rondo de kluboj kaj societoj, kiel grandaparte okazis. Se oni sukcesas montri la favorojn de Esperanto, mi kredas en granda aliĝo.

DEMANDO.-

Jen demando tre aktuala, la mondo evoluiĝas, la malkontenteco flanke de la junularo estas grava kaj profunda, oni krias, oni protestas, oni postulas. KION VI OPINIAS PRI LA JUNULARA  
INTERNACIA SITUACIO?

RESPONDO.-

La gegunuloj estas pli konsciaj nun ol antaŭe.

Ili spertis la malĝustecon en la mondo kiel pro - funde seriozaj kaj ne nur povas resti neaktivaj. Ili scias, ke devas strebi por plibonigi la socion kaj labori por pli granda egaleco kaj libereco. Mi kredas ke la junularo per siaj protestoj granparte povas rapidigi la evoluon en pozitiva tendenco.

DEMANDO.- Alia jaro estas for, la 25<sup>a</sup> kongreso de T.E.J.O. kiu okazos en Tیرهو estas tre proksima, nia bela kaj simpatia Helen, CU LA 25<sup>a</sup> JUNULARA INTERNACIA KONGRESO PREZENTIGAS TRE ALLOGA?. Certe viaj vortoj tre interesigos la hispanan esperantistan junularon.

RESPONDO.- Ci somere "SEJO" havas la plezuron aranĝi la 25-an Universalan Junularan Kongreson en Svedujo, no me en Tیرهو; moderna kaj bele situanta antaŭrbo de Stokholmo, 17 km. sude de la ĉefurba centro. La kongreso okazos tuj post la Universala Kongreso en Helsinki (Finnlando), de la 3<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de aŭgusto. Tیرهو estas bonega loko por ĝusta Junulara Kongreso, ĉar la loĝantaro de la urbeto estas tre juna, havas mezaĝon de nur 18 jaroj. La Kongresa temo estos "Junularo kaj Socio". Kompreneble prelegoj pri la hodiaŭa junularo kaj socio. Programo: Antaŭtagmeze - prelegoj, diskutoj.

Posttagmeze - Laborkunsidoj, studvizitoj, sporto, bano.

Vespere - Danco, amuzado, kulturaj programoj.

Ni loĝos en moderna lernejo tute proksime al la kongresejo.

Ĝis nun aliĝis kontentiga nombro da gejunuloj, sed ni atendas multajn pli partoprenantojn.

Mi kredas kaj esperas ke la 25-a Universala Junulara Kongreso estos interesa kaj plezuriga.

VI ESTOS BONVENAJ EN Tیرهو!!

Intervjuis; Sebastia Ribes

VIKTIMOJ DE LA ATOMBOMBO.- Alia libro pli, kiu pritraktas la tragedion kiu travivis la japanaj urboj, Hiroŝimo kaj Nagasako.

Viktimoj de la atombombo estas alia avertilo por la homaro se ĝi vere deziras kaj kapablas lukti por la paco. Viktimoj de la atombombo estis tradukita al Esperanto de nia samideano Julio Onoŝin, kiu bruligis sin, kiel proteston por la milito en Vjetnamio kaj la okupado de la insularoj Okinawa flanke de Usono. La libron ĝentile mi ricevis de Sro. Tadao Yosida. 42 Naramuti, Kuri-si Japan, al kiu mi petas sendu vian dankesprimon.

L A V I V O E N I

NEKROLOGO: El dia 11 de juny, morí a l'edat de 77 anys, la senyora Coloma Cartaña Montserrat, vidua de Bartrolí, mare dels nostres consocis Concepció Bartrolí i Vicenç Mateu. A tota la familia la nostra más sincera condolença.

- - - - -

Centro de Esperanto Sabadell ha puesto ha disposició de to dos sus asociados, simpatizantes, amigos y entidades con las que sostiene correspondencia el apartado de correos nº 407. Por lo tanto se puede dirigir la correspondencia, bien a nuestro domicilio social, Gral. Mola 99, o al citado apartado 407 de nuestra ciudad.

Este año Centro de Esperanto Sabadell, para mayor divulgación del Esperanto pone a disposición de todas las personas interesadas en adquirir conocimientos de este idioma, una forma de estudio inédito en Sabadell.- Un Curso por correspondencia.

El citado curso está destinado unicamente para Sabadell y su comarca. No dudamos de la favorable acogida que tendrá en nuestra ciudad y comarca, así como entre nuestros socios, al mismo tiempo que le propagarán con ardor y eficacia entre sus familiares y amigos.

El Curso comenzará a primeros de Octubre, retrasando el comienzo del curso tradicional para después de Navidad. En el próximo Boletín se dará una amplia información sobre el citado curso.

B I B L I O T E K O

Dum la arkivado de la revuoj al kiu estas abonanta nia Centro ni konstatis la mankon de la jenaj numeroj: N.roj 3ª kaj 4ª de Norda Prismo. La N-ro Novembro-Dece mbro de Oomoto. La N-roj 6ª kaj 13ª de Heroldo. La N-ro 57ª de H.E.J.S., kaj la N-ro de Decembro, de U.N.E.S.C.O.

Ciuj cititaj revuoj apartenas al la jaro 1968.

Ni petas, bonvolu resendi la menciitajn gazetojn al nia biblioteko, por ke ni povos kompletigi la jarkolek ton de 1968.

- - - - -

Pro mankspace ni devas prokrasti la trian kaj lastan parton de la artikolo de nia aniko R. Pystynen "De Hamina AL CAN ORIACH", al kiu ni petas ne estu tre severa kun ni!!!

TEMPOJ PRI NIA TEMPO:

ĈU ADAPTIĜI AL LA CIRKONSTANCOJ; ĈU IL IN SANGI?

Fakte ĉiu persono, esperantisto aŭ ne, estas miksitaj en sama civilizo, kiu nun tendencas fariĝi homogena. Tio estas, kun la samaj trajtoj en ĉiu lando, kie ajn ĝi estas lokita sur la tersurfaco. Nia civilizo fariĝas homogena, ĉie la produktado estas industria kaj la landoj, kiuj ankoraŭ restas subevoluintaj revas fariĝi industriaj: meĥanika industrio, meĥanika agrokulturo. Ĉie oni same revas pri altiĝo de la vivnivelo kaj strebas eniri en la socion de produktado kaj konsumado. La ĉieaj nuntempuloj revas pri la moderna vivmaniero.

Mi memoras, ke iam en nia regiono oni entuziasmigis la amason per revo de propra dometo kaj fruktoĝardeno. Sendube nun neniu entuziasmigus per tia revo. La vivkondiĉoj ŝanĝiĝis kaj eble oni revus pri propra vilao kaj aŭtomobilo. Tiaj estas la nunaj revoj kaj pri ĉio alia la plimulta nombro estas indiferentaj. Tio okazas ĉi tie kaj en iu ajn loko sur la mondo. Tio pruvas, ke la homaro unuiĝas, ĉar ĉie oni havas la samajn revojn kaj ĉie oni sopiras al sama vivmaniero. Ĉie oni konstruas similajn domojn kaj ĉie oni vestas sin laŭ sama modo.

Kvankam ni simpatias al uniformeco, ĉar ĝi malpliigas la personecon, oni devas konstati la nunan iradon de la socio. Nur la konsciiĝo pri la realo povas pravigi realajn konkludojn, ĉar alie oni konfuzas la realon per niaj revoj kaj ia ajn konkludo nia estus senbaza cerbumado.

Eble la nuna socio troviĝas en punkto nulo pri ideoj pro ĝenerala miksiĝo de homoj, ideoj, revoj kaj idealoj. La pasintaj kolektivaj idealoj disfalis pro ĝia frapo kun la realo kaj la aktualaj revoj rilatas nur al vivnivelo, somerferioj, aŭtomobiloj, k.t.p. kaj tio okazas ĉie, ne nur en nia lando, sed en la tuta Europo, en la tuta Ameriko, en ĉiuj evoluintaj landoj kaj en la restantaj ankoraŭ subevoluintaj oni revas ankaŭ pri la vivmaniero de la evoluintaj. Ne estas strange, ke la propagando pro idealoj restas sen aŭkultantoj, oni estas surdaj por idealismoj, eĉ se tiu idealismo estas Esperanto.

Kion ni esperantistoj devas fari por adaptiĝi al la cirkonstancoj? Se ni forlasus la idealismon entenantan en Esperanto, ĉar ĝi ne alportas al ni materialan profi -

ton. Sondube la vorto idealo en nia tempo estas eksmoda, sed ni povas prezenti la saman aferon alimaniere, nek kiel idealistoj, nek kiel revemuloj. Nun la idealo entena ta en la Esperantismo jam estas pli ol idealo, jam estas pli ol revo, la idealo de la paco jam estas pli ol idealo kaj pli ol revo, la paco estas nepre neceso, estas kondiĉa neceso por la ĝuado mem de la moderna vivmaniero. Sen stabila paco, ĉio alia de nia civilizo estas kiel kartluda kastelo. La paco, la morala unuiĝo de la homaro, la kunfratiĝo de la popoloj estas necesa kondiĉo por la antaŭenirado mem al sopirataj revoj de la altiĝo de la vivnivelo, la konforto, la somerferioj, k.t.p.

Nova atom milito detruos ĉion, eĉ la fizikan vivon mem de milionoj kaj milionoj da homoj. En kontrasto kun la danĝero de nova tutmonda milito, la homoamaso nenion faras por ebligi la pacon. Ankoraŭ la plimulta nombro estas indiferenta al ĉio, kio laŭŝajne nerekte rilatas al ili. Sed, ĉu la paco aŭ la milito nerekte rilatas al ĉiu.

La paco ne estas donaco, estas io, kion oni devas koleri; estas io, kion oni devas konstrui kaj tial nur la konstruantoj de la paco estas tiuj, kiuj prave meritas ĝin. La agado por la paco, la agado por la kunfratiĝo de ĉiuj popoloj; ĉio, kion enhavas en si la Internacia Ideo de Esperanto nun estas devo, devo ne nur de la esperantistoj, sed morala devo de ĉiu homo, kaj kiel devon ni devas propagandi Esperanton.

La nuna socio kvazaŭ eksplode prenis sian modernan aspekton. En la daŭro de nur du jarcentoj la tradicia vivo tute renversiĝis kaj tio okazis per senbrida disvolvado, per la pŭsado mem de la teknika progreso. Sed la antaŭenirado de la socio ne devas okazi hazarde nek blinde. La socio devas konciiĝi pri la realaj faktoj de la socia evoluo kaj tiel kapabli gvidi la socion por apartiĝi ĝin de erara vojirado.

Nun ĉiuj faktoj indikas al ni, ke se oni ne ŝanĝas la ĝeneralan penson kaj agadon de la homoamaso, al tiu granda konstruaĵo de la moderna vivo minacas ruiniĝo. Tiaj estas la nunaj cirkonstancoj sed, ĉu ne estas vere, ke tio plej grava ne estas adaptiĝi la la cirkonstancoj, sed ĉu ne estas vere, ke tio plej grava ne estas adaptiĝi al cirkonstancoj, sed kontraŭe ilin ŝanĝi?.



1-a FRANCA - HISPANA RENKONTIGO

Kun granda sukceso okazis la 1-a Franca- Hispana Renkontigo en Perpignan la 8-an de majo. Prenis parton ĉirkaŭ 110 geesperantistoj. El Hispanujo ĉeestis 74 personoj.

La Kongresejo estis aranĝita en la Salono Aragò. Je la deka horo komenciĝis la oficiala parto sub la prezido de Sro. Llech Walter akompanate de Dro. Albaut Prezidanto de la Unigo -Esperantista de Francujo kaj Dro. M. Sancho Izquierdo.

Malfermis la kunsidon Sro. Llech Walter, kiu dankis la ĉeestadon en nombro pli alta ol la kalkulita. Li legis la aliĝon de Sro. Sadler de U.E.A., de la fratoj Sekelji, de Centro de Esperanto Sabadell, kaj de diversaj esperantistoj de Narbone, Vic, Barcelona, Valencia kaj Madrid.

Poste Sro. Llech Walter transdonis la parolon al Dro. M. Sancho Izquierdo, kiu legis dokumentitan skribaĵon pri la historio de Esperanto en Hispanujo, pli ampleksan ol la publikigitan en kongreslibro de la U. K. en Madrido. Estus tre interese pri tiu temo ke iu persono tre dokumentita faru profundan studon. Ankoraŭ estas vivantaj multaj aktivuloj de la esperantismo en Hispanujo de tiuj tempoj.

Dro. M. Sancho Izquierdo komencis rememorante siajn unuajn paŝojn en la hispana Esperanto-Movado kiam la V<sup>a</sup>. U. K. en Barcelono, la fondon de la grupo frateco en Zaragoza. Li rememoris ke en 1905 estis fondata la klubo de Manresa, en 1907 s-ro Garzon fondis en San Fernando novan grupon kaj poste oni starigis la grupojn en San Sebastian, Alicante, Madrid, k.t.p. Li rememoris ke Hispanujo estis la unua lando en kiu estis permesita la instruado de Esperanto oficiale, laŭ dekreto de la jaron 1.911. En 1.916 oni starigis la Zamenhofan Asocion en Madrido, ankaŭ en 1.916 okazis la unua kunveno de la Konfederacio Kataluna-Aragona-Baska, en Reus, sub la prezido de E. Gaston. La unua kunveno de Iberiaj Esperantistoj okazis en 1921. Poste, daŭrigis, Dro. Sancho Izquierdo, mi intervenis en du centaj kaj politikaj aferoj kaj ĉesis mia aktivado en la Esperanto-Movado ĝis la jaron 1.959 en kiu mi revenis okaze la U. K. en Varsovio. En 1.947 estis denove starigita Asocio de Esperantistoj en Valencio, kaj en 1.951 okazis la unua kongreso de la nova serio en Tarrasa. Ankaŭ li rememoris ke Sro. Jordana de Pozas, eksministro de Eksteraj Aferoj post la intercivitana milito estis malnova

esperantisto kaj vicdelegito de U.E.A. en Zaragozo.

Sro. Llech gratulis kaj dankis al Dro. Miguel Sancho Izquierdo kaj prezentis al Dro. Albaut kiel meritplenan esperantiston, li estis la unua esperantisto kiu atingis la titolon de Esperanto de U.E.A.

Dro. Albaut salutis en nomo de la U.F.E. kaj dediĉis sian paroladon al refuto de parolado farita de Sro. Bresant en internacia kongreso de interĝemeliĝoj de urboj. Tiu sinjoro asertis ke Esperanto ne estas kultura lingvo, laŭ tiu sinjoro la esperantistoj devus loĝi en dezerta insulo, paroli sian lingvon kaj kune, iomete-iomete krei esperantan kulturon. Dro. Albaut tre energie kaj konvinke asertis: KE NI, LA ESPERANTISTOJ, NE BEZO - NAS DEZERTAN INSULON POR KREI KULTURON.

Tiu sinjoro, daŭris Dro. Albaut, ne konas la esencon kaj la fundamenton de nia agado. Nia lingvo estas bazita en tri elementoj: la hindo-eŭropeaj lingvoj, la latina kaj latinidaj kaj leste, la scienca lingvo. Poste li rimarkigis la profundan intervenon de la latina lingvo kaj fine montris; ke la moderna scienca lingvo same al Esperanto formas tute regularan terminologion. Kun nia propra literaturo kaj la traduko de fremdaj literaturaj verkoj al Esperanto, ni jam kreis nian propran kulturon.

Fermis la paroladojn Sro. Llech kiu anoncis etan modifon en la programo. La urbestro de Perpignan anoncis ke li ne povos ricevi nin ĉe la urbodomo ĉar li devas ĉeesti la inaŭguron de la Internacia Foiro, sed ke li tre ĝentile akceptos nin ĉe la Foiro.

Kiam Sro. Llech avertis lin pri la fakto ke ni estis multaj (li nur enkalkulis 50 personojn) pli ol 125, la urbestro respondis, tre afable, la afero ne graves. En simpatia etoso li trinkis kun ni la honoran vinon.

Ni kunmanĝis en restoracio "Raylli" kaj dum la manĝado amuzigis nin la ludoj kaj kantoj de diversaj samideanoj. Dro. Sancho Izquierdo anoncis kaj invitis al ĉiuj por la venonta Renkontiĝo en Jaca.

LUIS M<sup>a</sup> HERNANDEZ IZAL

Sant Pau D'Ordal

LA SOLE VERA SOLVO

=====

Malgraŭ la multnombraj internaciaj rilatoj de la nuntempa homaro, kongresoj, tutmondaj revuoj, turismo, radiaj elsendoj, k.t.p., ankoraŭ multaj el niaj samtempuloj apenaŭ oksentas la problemon de la lingvo, aŭ se ili ĝin oksentas, ili estas kontentaj pri la nuna solvo al ĝi trovita per la uzado de pluraj lingvoj naciaj, precipe la angla kaj la franca, eĉ plie, el tia plej grandaparto da nepripensemo - loj, multaj opinias ke la problemo de internacia komunikado estas jam fakte solvita per la angla lingvo.

Aliaj, memorante la estintecon de la okcidenta kulturo, dum kiu la interkumunicado de la intelektularo estis perata de la latina lingvo, emas revigligi tiun ĉi per la nunaj rilatoj internaciaj, kredante ke, ĉar ĝi estas preskaŭ neŭtrala, ĝi estus pli facile akceptata tra la tuta mondo ol iu ajn lingvo nacia.

Sed la komuna difektiĝo de ambaŭ solvoj-krom aliaj unuopaj kiujn mi ne povas konsideri ĉi-tie estas videble, ke la ellerno de tiaj lingvoj sufiĉgrade por praktikaj kaj kulturaj celoj estas plurjara tasko postulanta pli da strebo - de kaj laboro ol meze nuntempa homo povas al ĝi dediĉi.

Nun, nepre regula lingvo lernebla en mallonga tempo nur povas esti vera solvo, kaj tian kondiĉon povas nur havi arte faritaj lingvoj, el kiuj Esperanto pruvis jam esti, la plej taŭga kaj deca kaj ankaŭ la plej facila kaj rapide ellernebla.

J. ORDIERES

(Grupo A. Jovellanos - Gijón)

UNIVERSITATA DISTINGO AL DOKTORO URMENETA

La pasintan 15-an de aprilo kaj en solena akademia akto, D-ro, Fermín de Urmeneta y Cervera, Prezidanto de H.E.I., ricevis de manoj de Lia Moŝto la rektoro de la Universitata Distrito de Barcelono, la titolon kiel Membro de la Akademio de Doktoroj de nia Universitata Distrikto.

La akten prezidis la barcelonaj aŭtoritatoj.

La eniro en ĉi tiu grava sfero de D-ro Urmeneta oni antaŭvidas kiel ekeston de baldaŭaj kontaktoj inter la internacia lingvo kaj tiuj medioj universitataj.

L A F E R I O

Kie vi ferios ĉi-jare?, ĉu vi vojaĝos eksterlanden?, ne ni veturos tra nia lando..., ni iros al la marbordo. Tiuj kaj multaj aliaj demandoj kaj respondoj estas aŭde - blaj dum ĉi-tiuj tagoj, strate, hejme, en la laborejo kaj en iu ajn angulo en kiu troviĝas homoj.

Ĉi tiuj liberaj tagoj, pacience atendataj dum la jaro reprezentas spiritan nutraĵon kiun ĉiu homo bezonas por daŭrigi dum la resto de la jaro la rutinan vivon. La kona tiĝo kun aliaj homoj, kutimoj, vivmanieroj estos rememo - roj kiuj konsolos kaj kuraĝigos nin ĝis la venonta jaro. La sperto akirita dum la ferio estas kulturo kiun ni de - vas enmagazenigi en nian menson, en nia scien kaj kiun brave ni prezentos kaj pri kiu ni parolos al niaj konatu - loj. Liberiĝi dum kelkaj tagoj de la laboraj kaj hejmaĝ zorgoj estas reaktiro de morala forto kiun ni ŝaĝe devas disdoni dum la restantaj tagoj ĝis la venonta ferio.

Cio antaŭdirite estas normala afero por normala homo, sed por ni esperantistoj, la afero pligrandiĝas. Estas la epoko de nia rikolto. Dum nia ferio estas la foiro de nia movado, ĉar ni prezentas al la neesperantistoj praktike la valoron, taŭgecon kaj neceson de nia idealo. Ĉiu kons - cia kaj luktanta esperantisto devas uzi Esperanton.

Ni esperantistoj montras al mondo per niaj kongresoj, renkontiĝoj kaj aliaj esperan - tistaj manifestacioj ke la lingva problemo estas solvita.

SAMIĉANOJ FELICAN FERION, KE VIA NOTKAJERO REVENU PLENPLENA !!

CENTRO DE ESPERANTO SABADELL

Societejo: Gral. Mola, 99

Poŝtkesto 407

SABADELL (Barcelona)

Hispanujo

REGULARO DE "RONDO DE ESPERANTISTAJ LIBROJ-AMIKOJ"

R. E. L. A.

- 1<sup>a</sup> - Ciu kiu amas kaj ŝuas la legadon de libroj, povas aparteni al R. E. L. A.
- 2<sup>a</sup> - Pro tio ni kress R.E.L.A.-n kiel sektion de Centro de Esperanto Sabadell.
- 3<sup>a</sup> - Ciuuj Libroj-Amikoj povas aparteni al R.E.L.A. kun laŭvola kotizo.
- 4<sup>a</sup> - R.E.L.A. periode aĉetos librojn, laŭ la monkvanto disponebla.
- 5<sup>a</sup> - Ciu R.E.L.A.-ano povas elekti la librojn deziratajn, pro porcie al la pagita kotizo.
- 6<sup>a</sup> - Dum unu jaro la libroj apartenos al R.E.L.A. kaj ĉiu membro de R.E.L.A. rajtas legi kiun ajn libron sen konsidero al sia kotizo. Pri difektita libro respondecos la difektinto.
- 7<sup>a</sup> - Giujare oni organizos feston dum kiu oni disdonos la librojn al la membroj de R.E.L.A.
- 8<sup>a</sup> - Al R.E.L.A. povas aparteni ĉiuuj Libroj-Amikoj kvantan ili ne estas membroj de Centro de Esperanto Sabadell.

---

Cefa prizorganto de ĉi tiu sekcio estas Sro. Juan Sala Campamá, Pintor Borrassá, 98, en kunlaboro kun Centro de Esperanto Sabadell.